VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského klubu v Mnichově Hradišti, pro členy a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161 -
Cena: dobrovolný příspěvek.
Povolil OÚ Ml.Boleslav, odb.kultury čj.47/87-403/16
Podávání novinových zásilek povoleno oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze, č.j.P/Fiš-2295/92 ze dne 16.XI.1992

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx
Numero 4 Oktobro 1995 Červenec Číslo 4

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxm

PREPAROJ POR LA UNIVERSALA KONGRESO EN PRAGO 1996

En niaj kluboj regas maltrankvilo. Ĉiuj antaŭmetas al si la demandon: Kia estas la stato de preparoj por la Universala kongreso? Ĉu ni regos la malfacilajn taskojn de la gastigantoj? Tio instigis nin antaŭmeti demandojn pri la stato de la preparoj en la persono plej kompetenta, al nia prezidanto ing. Vlastimil Kočvara, kiu niajn demandojn perletere respondis:

V našich klubech panuje neklid. Všichni si kladou otázku: Jaký je stav příprav na Světový kongres? Zvládneme nesnadné úkoly hostitele? To nás vybídlo předhodit otázky o stavu příprav osobě nejkompetentnější, našemu předsedovi ing.Vlastimilu Kočvarovi, který nám naše otázky písemně zodpověděl:

La Kongreso okazos en Palaco de kulturo en Prago. Čedok zorgos ne nur por eksterlandanoj, sed ĝi prizorgos enloĝigon de ĉiuj, kiuj ĉe LKK (loka kongresa komitato) aliĝos por loĝi. Kompreneble, ke partoprenanto ne devas loĝiĝi nur pere de oficiala loĝiga servo. UK-on ne kapablas organizi nur LKK, kiu estas nun 12-kapa. Tiuj LKK-ano estas nur respondecaj, sed por realigi diversajn servojn oni bezonas pli multe da homoj, certe temos pri dekoj da ili, mi kalkulas minimume 50, sed eble pli multe. Ni devos elekti tiujn helpantojn (oficiala funkcio) el aliĝintoj al UK-o, kiuj bone regas la lingvon. Por farita laboro oni post la kongreso redonos certan parton de la kotizo (laŭ Kongresa regulo). Antaŭkongreso estas planata en Brno kaj ĝis programo enhavas unutagan restadon en Bratislava. Tamen ni, bedaŭrinde, ne trovis kompetentan asocion por organizi la Antaŭkongreson. Sed la Antaŭkongreso estas ankoraŭ traktata. Postkongreson akceptis Germana EA, kiu planas organizi ĝin en Saksujo kaj parte en Norda Bohemio. Programon preparas tieaj samideanoj. Mi ankoraŭ ne havas sufiĉajn informojn. Pri junulara programo zorgas LKK-anino Lucka Karešová, kiu havas propran realigan teamon.

Universala kongreso ĝenerale estas alpaŝebla por ĉiuj. Mi scias, ke la kotizo estas alta sufiĉe, sed oni devas scii, ke oni ne eblas doni tute malaltan kotizon. Por ĉeĥoj estos ioma rabato, precize mi ankoraŭ ne scias kia, ĉar detalojn ni traktos komence de septembro kun ĝenerala direkto Milojeviĉ. Kompreneble, ke ĈEA povas gastigi kongreson. Ne kredu, ke nun ĈEA estas malpli forta ol pli antaŭe. La forteco ne dependas de fakto, ĉu ekzistas aŭ ne la sekretario aŭ oficejo. La forteco dependas nur de aktivaj homoj, ĉu ili agas bone aŭ ne. Aŭspiciantoj ankoraŭ ne estas nomitaj. La rabato de urba trafiko ne eblas estis ankoraŭ pritraktata, ĉar la urba trafikentrepreno mem ne scias, kia estos la situacio post unu jaro. La prezoj nun konstante kreskas, venontjaran nivelon neniu scias.“ …

Nia prezidanto promesis disponigi pluajn informojn post vizito de la direktoro Milojeviĉ kaj traktado kun li. Por organizi Universalan kongreson estas bezonata vasta nombro da diversaj helpantoj kaj volontuloj. Ĉiu el ni povos iamaniere helpi. Precipe estos bezonataj urbogvidantoj kaj gastigantoj kun propra loĝejo eĉ el proksimeco de Prago. Pri la situacio ni informos niajn legantojn en la estontaj numeroj de Verda familio. La plej freŝajn informojn alportos ankaŭ ĉiumonata „Informilo“ de handikapula sekcio, precize aperanta.

La universala Kongreso en Tampereo (Finlando) – la granda festo de ĉiuj esperantistoj en la mondo. - 90 jarojn post la Unua Universala Kongreso en Bulonjo sur Maro, en jubilea jaro de kvindekjariĝo de Unuiĝintaj Nacioj okazis favora konfiguracio de steloj la jubilea 80a UKo en Tampereo, kiu allogis 2443 gesamideanojn el 68 landoj – tio estas ja pruvo de vivanteco de ideo de la Internacia Lingvo. Nombro, kiun de la jubilea UKo en Varsovio (centjariĝo) superis nur la Viena kongreso en 1992. Finis ĉi tie la sesjara oficperiodo de la prezidanto John C.Wells, kiu por plua periodo ne povis esti elektita. Gesamideanoj, venintaj el ĉiuj anguloj de la mondo, estis bonvole akceptitaj en belega fina urbo Tampereo kaj la kongresa halo estis plenŝtopita dum la inaŭgura tago (29.VII.) de malpaciencaj atendantoj pri la ceremonia inaŭguro. Tampereo nombras malpli ol 200 mil loĝantojn kaj ĉio funkcias pli glate ol en milionkapaj metropoloj. Oni povis danki la atenton de amas-komunikiloj, la lingva problemo ne povis ne interesi popolon kiu ĝin ĉiam spertis proprasorte pro sia lingva aparteco, kaj kiu lastatempe, post aliĝo al Eŭropa Unio, eĉ pli ĝin konscias. Tampereon markis finoj daj komencoj. Finiĝis la mandato de unu Estraro, kaj sekvis ĝin nova teamo (eĉ) pli juna kaj pli tutmondeca. La sepkapa teamo (meza aĝo: 45 jaroj), kun azia prezidanto kaj entute tri ne-eŭropanoj, havas ŝancon komenci epokon de malplia eŭropeco. Aliflanke, John Wells, kiu adiaŭis post sesjara prezidado, kredeble fermis movadhistorian ĉapitron dudek-jaran per sia memorriĉa festparolado. La Esperanto-movado ĉi-jare (letos) distilis el si (vydestilovalo) perfektan Universalan Kongreson. ĈU: kia movado, tia kongreso? Siavice, la UKo metas spegulon (zrcadlo) antaŭ la Esperanto-movadon: ĉu vere kia kongreso, tia movado? Tiel vigla, laborpreta, iniciatplena? Ĉu ankaŭ tiel sobra celkonscia kaj bone organizata?

Ĉiu UKo procedas laŭ longjare kutimiĝinta programo, kiu fariĝis tradicia. En solena malfermo ni povas aŭdi salutojn de eksterlandaj kaj hejmaj gastoj, precipe reprezentantoj de diplomata ĥoro, kaj kelkvortaj prezentadaj salutoj de reprezentantoj de unuopaj landaj asocioj. Pinta travivaĵo por ĉiu esperantisto estas aŭskulto de la solena parolado de la prezidanto de UEA. Adiaŭan tonon kaj taksadon pri la periodo de la lastaj ses jaroj alportis la festparolado de John Wells.

Plej grava estis finpunkto post la dolora splinto en la gvidado de UEA dum Hamburga kongreso 1974, en kiu abdikaciis longjara prezidanto Ivo Lapena, akuzante la membrojn de la komitato je preparo de komunista puĉo kaj fondante opozician asocion. La paciĝo estis preparita jam dum la kongreso en Brighton, kiam Lapenna estis preta akcepti la rolon de rektoro por dumkongresa internacia universitato kondiĉe, ke UEA deklaros „ke ĝi forte bedaŭras la personajn atakojn, ofendojn, insultojn kaj kalumniojn kontraŭ prof. D-ro Ivo Lapenna faritajn en ligo kun la elekto de la nova estraro de UEA en 1974. Tamen unu monaton post la interkonsento en kadro de la preparoj de UKo en Brighton Lapenna mortis. Ĉiuj funebris, necesis nekrologi, de decis paroli pri malnovaj kvereloj kaj la afero pri interkonsentita partondeklaro forgesiĝis. Wells dum adiaŭa festparolado metis punkton post la afero per oficiala deklaro, kiu sonis: „En la nomo de UEA mi ja bedaŭras, ke okazis tiuj atakoj kaj kalumnioj. Mi esperas, ke neniam denove tia situacio makulos nian historion.“ Wells emfazis pri nuna harmonia kunlaboro en la komitato kaj ĝiaj rezultoj: super sep mil individuaj membroj kaj ĉijara nombro de 260 membroj de societo de Zamenhof estas rekorda. UEA estas finance pli forta ol kiam ajn antaŭe, la periodaĵoj aperas akurate, niaj servoj funkcias glate kaj ankaŭ ĉijara kongreso surprizis per sia grandeco. Tamen, se malkontento estas sprono por aktivi kaj strebi pli alten, ni malkontentu! - En siaj lastaj vortoj Wells dankis la kunlaborantojn de la pasinta periodo kaj deziris sukceson al elektota komitato kaj ĝia gvidantaro. Fine sonis esperantista himno kaj komenciĝis vigla agado de multaj kongresaj sekcioj.

El la <u>decidoj de la komitato de UEA</u>: La premio de Zamenhof estis eljuĝinta ĉijare al Prezidento de la Respubliko Finnlando Marti Ahtisaeri (3000 US dolaroj). - Novaj honoraj membroj de UEA estis elektitaj. Inter ili estas ankaŭ la nomo de meritplena slovaka esperantisto Edward V. Tvarožek kaj estinta prezidanto de UEA Humhrey Tonkin. - La buĝeto estis favora: la deficito reduktiĝis ĝis „nur“ 24000gld. - La ĉefa novaĵo: Estis elektita la nova komitato, en kiu kvin el sep membroj estas novaj. Nova prezidento fariĝis Aziano, nome prof. D-ro Lee Chong-Yeong el Koreio. Renée Triolle (Francio) vicprezidanto. Mark Fettes (Kanado)-ĝenerala sekretario (+publikaj rilatoj), Frank de Geus (Nederlando)-financoj. Povilas Jegorovas (Litovio)-informado, edukado kaj landa agado en Orienta Eŭropo. Michaela Lipari (Italio) – kongresoj, kulturo, kontakto kun junularo. Amri Wandel (Israelo) – faka agado rilate la sciencon, lingvopolitiko en la movado. Urĝa tasko por la nova komitato estas apliki jam diritan decidon de la Komitato, nome ekvilibrigi la jarkalkulon de definite forigi la jaran deficiton: tio permesos utiligi pli da financaj rimedoj por la informado kaj disvastigado de Esperanto. La komitato akceptis du novajn palanda Asociojn (Rumanio kaj Togolando). - Kongresa (ĉef)temo: „Ni la popoloj – unu mondo aŭ disaj eroj“ okaze la 50jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj. - Akademio de Eo (kiu zorgas pri lingva pureco) klarigis sian agadon (Bormann). Wandel paroladis pri lingvo-politikaj la rolo de la Akademio rilata al la vivanta lingvo-uzo, slango, neologismoj kaj neortodoksaj formoj. Dum la preparado de la nova PIV plej ofte estis diskutata la problemo de la landnomoj. - Internacia Kongresa Universitato: Naŭ profesoroj prezentis naŭ lekciojn el fako: astrofiziko, astronomio, ekonomiko, geografio, geologio, lingvo-didaktiko, medicino, psikiatrio kaj slavistiko. - Belarta konkursoj aljuĝis ĉiukategorie tri premiojn kaj honoran mencion. Inter la premiitoj aperas 1 nova nomo de ĉeĥo Václav Vanc pri la vidbendo „Do, venante en Ústí nL“. Disvastigo de vidbendaparatoj en kluboj espereble ebligos ĝui multe pli rektan kontakton kun internacia Esperanta kulturo. - Ne nur libroj. Ankaŭ kompaktdiska (CD-rom) bildstrio „Jack Palmer, detektivo de la nokto“ premiere troviĝis en la kongresejo.